

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Redaktoroj: S. Alberich - Jofrè, Delfi Dalmau, Marian Solà

L'Element Artificial en el Llenguatge

Avui constatem en la llengua parlada tota mena de mots i girs introduïts un dia *artificialment* en la llengua escrita, els quals han penetrat talment en aquella que ningú no diria que trenta anys endarrera hi eren completament desconeguts. Sabem, doncs, per una llarga experiència, que el llenguatge parlat està lluny d'ésser impermeable als progressos de la llengua literària...

POMPEU FABRA

Ja sabem els arguments que s'alcen contra l'ús d'una llengua artificial. Però creiem que si es redueix el paper d'aquesta a una missió auxiliar, d'inter-comunicació entre la gent que d'altra manera no s'entendria, els desavantatges de l'artificialitat lingüística queden molt minvats. D'altra banda, és que en les llengües mateixes d'avui, sobre tot quan les usa la gent culta, no hi ha una gran part d'artificialitat? Una gran part de les veus tècniques i científiques són mots artificials. I aquells que no concedeixen a l'esperanto una gran vàlua estètica, ni una sonoritat gaire simpàtica, hauran de reconèixer que en aquest aspecte resulten molt pitjors, per exemple, les monografies de medicina.

No n'hi ha prou, dintre la pròpia terra, amb l'idioma matern? Cal un altre llenguatge per fer-se entendre? Si és així, no ens aturem en solucions intermèdies. Anem cap a la solució total. Per aquest camí es va lògicament cap a l'esperantisme. I nosaltres, que, com el nostre company Nicolau d'Olwer, som devotíssims de la lògica, ens declarem des d'ara esperantistes militants.

ANTONI ROVIRA I VIRGILI

Fajreroj

Propagandaj Markoj de nia proksima Kongreso. — Diverskoloraj estas eldonitaj. Aĉetindaj kaj aĉeteblaj kontraŭ sendo de ptoj. 1'50 aŭ egalvaloro, por 100 markoj, al nia adreso de K. E. F., Carrer Carme, 30-Barcelona.

La pagoj por K. E. F. — Por faciligo ni pretigis akceptejon de pagoj de jarabonoj de nia gazeto (ses pesetoj en Iberio kaj Amerikaj landoj, kaj ses svisaj frankoj aŭ egalvaro en la ceteraj) kaj aliĝoj de grupoj kaj individuoj al la Kataluna Esp. Federacio, en la adreso de la Prezidanto, Carrer València, 245, Barcelona.

Servoj de K. E. F. al la Grupoj. — Gazetoj Esperantistaj el ĉiuj nacioj estas sendataj de nia Federacio al la Grupoj por sciigo al ĉiuj niaj samideanoj pri la tutmonda batado de nia Movado. Okaze de novaj kursoj aŭ aliaj motivoj la Grupoj organizu propagandajn paroladarojn kaj ekspoziciojn, por kio la K. E. F. estas preta plenumi petojn pri oratoroj kaj konsiloj.

Vi povas aĉeti nian gazeton ĉe la Barcelonaj grandaj librejoj «Catalonia», Plaça Catalunya, 17; «Nacional i Estrangera» Rambla Catalunya, 72, kaj, «Italiana» Rambla Catalunya, 125. Ĉi-tiu numero de K. E. kostas 50 pesetajn centimojn.

Pri nia proksima Kongreso en Palma. — Responde al insista peto de multaj gesamideanoj, kaj por gvido de ilia pretigo, ni diru ke la prezo de ŝipveturo inter Barcelona kaj Palma, *iro kaj reveno*, estas: en tria klaso, pesetoj 33'—; en dua klaso, 65'— ptoj; kaj en unua klaso 105'— ptoj. La veturo ordinare okazas kaj daŭras de la 8^a vespere, enŝipiĝo, ĝis la sepa matene. La vaporŝipoj estas tre bonaj. — La loĝado kaj manĝado en Palma kostas 20-30 %, malpli ol en Barcelona.





KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro* Redakcio : Carrer València, 245 - BARCELONA

Al Palma en Majo!

La radiotelefonio per si mem estas sukceso por nia idealo, ĉar Esperantismo celas la interkompreniĝon kaj la interrilatiĝon inter ĉiuj popoloj, kaj la malfacilo pro spaco ankaŭ estas baro kontraŭ la internacia komuniĝado. Ni do ĝoju ke la fizikistoj venkas la spacajn dum la esperantistoj disputas la lingvajn barojn inter la homoj.

Alproksimiĝas la XII^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio, kaj la XI^aj. Internaciaj Floraj Ludoj, kiuj nunjare okazos en la ĉarma insulo Mallorca, en Majo la tagojn 21 - 24.

Por solenigo de nia Kongreso kuniĝis en la nuna jaro la granda intereso, la universala famo por turismo al la plej bela mediteranea insulo, kaj la gravo de la premiario por la Floraj Ludoj konkursataj de la tutmonda esperantista verkistaro.

Kleraj samideanoj el diversaj landoj jam sciigis sian intencon veturi al Palma. Dekoj da verkaĵoj por la Floraj Ludoj jam alvenis. La entuziasmo de la balearaj samideanoj pli kaj pli varmigas. La Kataluna gesamideanaro pretiĝas veturi al Palma amase. El ĉiuj iberiaj regionoj venas demandoj pri la Kongreso. Al ĉiuj demandintoj ni ĝoje respondas kun peto ke ĉiuj veturu al Palma kie heroo batalanto kaj fidela samideanaro atendas transmarajn kamaradojn el ĉiuj landoj, nacioj, regionoj, urboj, vilaĝoj, rasoj kaj koloroj, kaj honestaj idealkampoj, akordaj kun la principoj de nia sankta afero.

Ni ankoraŭ devas prezentiĝi amase ĉien, por montri al ĉiuj ke Esperanto postvivis la krizegon, pli ĝuste, eble, la krimegon, de la granda milito. Ni montru ke nia idealo de komuna lingvo plej firme daŭras en nia cerbo, en nia koro, en nia lango kaj en niaj oreloj. Plej ofte ni aŭdigu kaj vidigu ke hieraŭa utopio fariĝis brila fakto, ĝojiga realo, logika afero dank' al genio Zamenhof.

(El parolado en Esperanto, de la Prezidanto de K. E. F., disaŭdigita de la Barcelona Stacio, la 8^{an} de Marto).

EMINENTAJ AMIKOJ DE ESPERANTO

La kataluna verkisto Eugeni d'Ors (Xenius) kaj lia verko "Glosaro"

(Prelego farita ĉe la Barcelona grupo "Paco kaj Amo")

Eugeni d'Ors hele brilas inter ĉiuj modernaj katalunaj verkistoj kaj lia personeco havas la plej grandan reliefon. Lia plej konata verko estas la «Glosaro», tiu riĉega aro da ĉiutagaj «Glosoj» pri aktualaj literaturaj, filozofiaj, artaj, sciencaj, politikaj, k. c., kiun li aperigis sur kataluna ĵurnalo kun la pseŭdonimo «Xenius».

Sed, krom fama verkisto, li ankaŭ estas eminenta filozofo, pedagogo, kvazaŭ majstro de skolo kiu kalkulis inter siaj adeptoj la plej valorajn katalunajn intelektulojn. Dum multaj jaroj li montris sian aktivecon okupante la Direkcion de Popola Instruado de la «Mankomuneco de Katalunujo», partoprenante la taskojn de la «Filozofia Seminario» en Barcelono, gvidante la starigon de la «Popolaj Bibliotekoj», inspirante la katalunan revuon pri pedagogio «Quaderns d'Estudi». Li estas ankaŭ talenta paroladisto kaj tre lerta arta kritikisto.

Limigante tiun-ĉi malgrandan studon je la analizo de lia verkista karaktero, ni prefere konsideros la ecojn de liaj «Glosoj». Ilia valoro iĝas aparte mirinda, se oni atentigas ke ili aperis preskaŭ seninterrompe ĉiutage dum longa tempo, kaj sekve ili eble estis foje verkataj kun tiu neevitebla urĝeco de la laboroj destinitaj aperi sur ĵurnalo. Tiu glosoj pritraktis la plej diversajn temojn: interesajn anekdotojn el ĉiuj landoj, artajn ekspoziciojn, librojn ĵus aperintajn, novajn ideologiojn, politikajn movadojn, gazetajn artikolojn, teatraĵojn, koncertojn, naciajn okazadojn, unuvorte, ĉion pli-malpli aktualan en ĉiuj kampoj. Ankaŭ, de tempo al tempo, la «Glosoj» ne estis komentario al io efektive aktuala, sed ĉiam ili estis bela disvolvo de iu ajn interesa penso de l' aŭtoro.

Sed pri la karaktero de tiaj glosoj plej bone ilustras la jena fragmento de unu el ili, kie la aŭtoro, parolante pri «La amo al la metio», entuziasme parolas pri sia, kaj kvazaŭ sin defendas kontraŭ iu el la kaŝitaj riproĉoj kiujn oni faris al li. Sin turnante konsile al sia fileto, li diras:

«Nu, mi diras al vi, filo, ke la amiko laboranta kiel karikaturo ne estas morala homo, ĉar li ne estigas spiriton en sia laboro. Ankaŭ ne estas sufiĉe deca la konduto de tiu alia sinjoro, la okulvitruo, kiu scias rakonti al vi tiel belajn rakontojn kaj kiu venas tetrinki kelkajn dimanĉojn posttagmeze. Tiu-ĉi verkas por ĵurnalo, estas ĵurnalisto. Kaj li ankaŭ parolas pri sia metio kvazaŭ li estus en galeroj: «Neeble estas fari literaturon!.. Ha, la literaturon!.. Mi, kompatindulo, devis forlasi la literaturon!». Jes, kompatinda, sed ne pro tio kion li supozas. Kompatinda,

Ĉar li ne scias kunigi sian amon al la literaturo kun la laboro de li farata. Li plendas pro tio ke li devas redakti tiujn mallongajn notojn pri la bana-laj okazaĵoj, nomatajn «raportetoj». Sed kiu malhelpas lin redakti bele la raportetojn? Beleco ne signifas ornamon, sed harmonion kaj delikatan adaptiĝon de la afero al sia uzo. Raporteto povas esti tre bela, same kiel lada laboraĵo, gazeta banderolo kaj forkolekto de balaaĵoj, se oni plenumis tion kun zorgo kaj ĝojo pri la rezultato. Se tiu-ĉi amiko redaktus la raportetojn kun ĝojo kaj zorgo pri perfektigo, li aligus sian laboron iom post iom kaj li ĝin igus tre alta... Via patro, filo, fieriĝas esti farinta tiel pri humila laboreto al li konfidita. Por komenci labori en verkado sur la ĵurnaloj, estis konfidata al li fako, kiu ĝis tiam estis konsiderita tute negrava. Ĝi celis nur amuzi la leganton de la ĵurnalo, distrante lin el la seriozaj aferoj, per la priskribo — sub la rubriko «Amuza fako», «De tie-ĉi kaj tie», «Scivolemo» aŭ aliaj samspecaj — de la groteskaj strangaj aktualaj, de la faro de stultulo kiu marŝis per la manoj, de la komikaj ekdezidiĝoj aŭ la sensencaj vetludoj en Usono. Via patro akceptis tiun modestan taskon kun ĝojo. Li klopodis baldaŭ alporti al la metio spiriton kaj amon. Li ne opiniis ĝin sennobla, sed plialtigebla, se nur volo kaj pacienco kuncelus al tio. Li ne hontis pri ĝi, sed male per ĝi li aspiris laŭdigi sin... Spirito kaj amo plenumis baldaŭ la deziratan miraklon. Sekrete, per neperceptebla ŝanĝo, la speco de l' laboro aliiĝis. Hodiaŭ ĝi jam estas nereconebla, kiel la sama. Kiu ne memoras ĝian senbrilan originon, tiuj opinias ĝin nova fako. Hodiaŭ, fileto, la laboro de via patro ĉe la ĵurnaloj estas opiniata de unuj bona, de aliaj malbona, sed de ĉiuj kiel verko de Filozofio, kiu estas la plej alta kaj malfacila el la intelektaj aktivecoj... Sed mi diras al vi ke ĉia metio iĝas Filozofio, iĝas Arto, Poezio, Elpenso, kiam la laboristo al ĝi donas sian vivon, ne permesante ke tiu-ĉi dispartigu en du duonojn, unu por la idealo, alia por la ĉiutagaj bezonoj, sed farante el la ĉiutaga bezono kaj el la idealo unu saman aferon, afero kiu samtempe estu devo kaj libero, rutino rigora kaj inspiro renovigata».

La riproĉoj, kiujn oni faris al Eugeni d'Ors, pretendas ke li skribas iom konfuze kaj afekte, *en majstro*, pri temoj ofte tro komplikitaj. Se vere ekzistas ia malklareco en la verko de «Xenius», malklareco ĉiuokaze tre relativa, tio dependas ne de *verkista* mallerteco, sed de tri aferoj: a) rimarkinda *aŭtora* originaleco; b) konstanta *lingva* pureco; c) eksterordinara kaj nevulgara *tema* alteco, precipe por tiu kiu specife estas leganto de ĵurnalo.

La originaleco de la stilo de Eugeni d'Ors estas tiel granda, ke estas sufiĉe legi nur kvar aŭ kvin liajn pecojn por konstati ĝin. Tiu originaleco reflektas grandegan kaj maloftan kulturon, ĝustan konon pri plej kontraŭaj sciencoj kaj artoj, *universalecon* de spirito observema, delikata, subtila. En lia stilo oni trovas specialan ĉarmon, oni vidas trajtojn nekomunajn, oni rimarkas *formojn* ne antaŭe viditajn, tamen unuavide tute klarajn. Se nur oni zorge atentus la *diron* de la aŭtoro, la kurbojn de lia penso,

La afektita lingvaĵo, kiun kelkaj trovis ĉe la «Glosoj», fakte ne obeas al la deziro de la verkinto esprimi sin *science* aŭ tro *solene*: ĝi nur estas logika sekvo de la penso kaj inteligento de Eugeni d'Ors, kiu, posedante profundajn lingvistikajn konojn, ne timis alpreni la unua la plej radikalajn procedojn por purigi la katalunan lingvon de fremdaj influoj kaj redoni al ĝi la genion kiun ĝi havis antaŭ la nacia dekadenco. La frutempa kaj kuraĝa uzado de novaj gramatikaj formoj kaj esprimoj, nun plene akceptitaj, kiun abunde [faris la «Glosanto», estis tio kio igis lin prezentata de kelkaj kiel *strangulo* amanta esprimojn malsimplajn, malglatajn.

La iufoje malfacila komprenebleco de la «Glosoj» devenas de tio, ke ili estis verkataj en la supozo ke la leganto konas en sufiĉa grado la temon preparolatan aŭ havas almenaŭ la kapablon eklevi sin al la necesa nivelo. Temoj pri filozofio aŭ psikologio ja ne povas aspekti tute travideblaj al la unua paro de okuloj. Sed, eĉ por nelertuloj, multaj «Glosoj» estas pli ol sufiĉe klaraj por vekti intereson kaj ebligi instruigon.

Ĉiurilate estas admirinda la «Glosara» verko. Ĝi estas valora ne nur pro la boneco de la stilo, pro la profundeco de la pensoj, pro la intereso de la pritraktitaj demandoj, sed ankaŭ, kaj ĉefe, pro la spirito intima, propra, nekonfuzebla, kiu vivas en ĝi. Per malmultaj vortoj la aŭtoro montras plej trafe sian opinion, sian senton, sian pasion, ne vundante tamen tro profunde la kontraŭajn opiniojn, sentojn, pasiojn. Liaj laŭdoj estas fervoraj kaj liaj kritikoj severaj. Eĉ kiam eble oni ne konsentas al liaj asertoj, oni admiras la *manieron* laŭ kiu liaj konvinkoj montriĝas. Lia penso foje apartenas al iu difinita sistemo, spiras evidentan partiecon, sed ĝenerale liaj opinioj estas serenaj, objektivaj, de ĉiuj akcepteblaj.

Vidu kiel delikate li asertas la superecon de Eŭropo aŭ de la Eŭropa kulturo, per la jena mallonga «Gloso» kies vortoj estas plenaj de subtila senco.

DISTANCOJ

Al mia amiko A. B.

Ne estas, estimata amiko amerika, la sama distanco de Eŭropo al Ameriko kiel de Ameriko al Eŭropo. De Ameriko al Eŭropo estas kelkaj dolaroj. De Eŭropo al Ameriko estas manpleno da frankoj.

Ankoraŭ pli — kaj tio-ĉi estas gravega, sendube. — De Ameriko al Eŭropo iradas kaprico. De Eŭropo al Ameriko iradas kapitalo. Tial de Ameriko al Eŭropo oni kutime venas kun la iluzio de la bona elspezo. De Eŭropo al Ameriko oni kutime iras kun la deziro de la bona profito.

Ankoraŭ pli — kaj tio-ĉi pliigas ankoraŭ la diferencon. — De Eŭropo al Ameriko oni faras ĉiam vojaĝon «iran». De Ameriko al Eŭropo oni faras ĉiam ian vojaĝon «revenan».

Ankoraŭ pli — kaj tio-ĉi jam estas decidiga. — Vojaĝo en Amerikon havas ĉiam ion similan al *esplorado*. Vojaĝo en Eŭropon, ion similan al *pilgrimado*. Dum la unua, nia fantazio, estante sur maro, vidigas al ni en la

malproksimo iun arbaron. Dum la dua, nia fantazio vidigas al ni Romon kaj la kupolojn de Romo.

...Sed, estas same! Romo troviĝos ĉiam, amiko karega, tie kie estos homo kiel vi.

En alia glosa, li lerte parolas pri tio, ke ne nur la vortoj de diversaj lingvoj diferenciĝas, sed ankaŭ la maniero laŭ kiu oni uzas saman vorton en malsamaj lingvoj. Tiun fakton, ke unuavide similaj vortoj de du lingvoj ne ĉiam estas plene ekvivalentaj, ni esperantistoj bone konas.

Jen:

NOMOJ, DIFERENCOJ, NUANCOJ

En angla lingvo la vorto «emfazo», la verbo «emfazi» aŭ «emfazigi» taŭgas por aludi la fakton ke oni vokas la atenton sur unu vorton, sur unu ideon, en aro da vortoj aŭ ideoj. En franca lingvo la sama afero estas nomata «reliefigi» aŭ «meti la akcenton sur...». — Ni katalunoj diras pli mallonge «substreki». (En senco iom malsimila al la «substreki» franca, kiu havas nuancon tute alian).

Ni observu, do, kiamaniere la esprimilo alilokiĝas malsuprenirante de unu al alia lando, pasante de unu lingvo al alia. La esprimobildo estas *optika* ĉe ni; *palpa* aŭ *akustika* en la lando franca; kaj jam *senta* kaj preskau *morala* ĉe la angloj. La esprimobildo evoluadas de tiuj pensantaj per la okuloj ĝis tiuj kiuj pensas per la koro... (Pensi per la koro, kio ĝuste ne signifas pensi «sindone», sed pensi per tiuj «rezonoj ne komprenataj de la racio»).

La moralo de tiu-ĉi malgranda studo pri vortoj, diferencoj kaj nuancoj, kuŝas en tio : humile konfesi kiom estas malfacile ke anglo plene komprenu nin, kaj kiom malfacile estas ke ni tute komprenu anglon.

Pasian laŭdon al la franca lingvo, kies *preteco* donas faritaj al la francaj verkantoj la plej riĉajn esprimojn, enhavas la glosa «Verki artikolojn». Ĝi esence estas fiera konstato pri la «klareco latina», kiun oni sentas ankaŭ en la spirito de nia kara Esperanta lingvo. Tiu-ĉi glosa ne estas flataĵo, sed sincera esprimo de la penso de ĝia aŭtoro.

VERKI ARTIKOLOJN

Franca artikolo de Revuo estas estetika produkto perfekta kaj definitiva, kiel estas tiaj greka templo aŭ plado de arĝentisto el Firenze. Mi hieraŭ pensis pri tio, legante kaj relegante ĉi-tiun artikolon de Maurice Blondel, jam dufoje aluditan en mia Glosaro. Pri tio mi povus esti pensinta antaŭ cent aliaj artikoloj aperintaj la saman tagon sur cent aliaj ĵurnaloj.

La mirindaĵo de bona franca artikolo estas ĉiam ĝia *senerara* konstruo; kaj, en la konstruo, la profunda senco de kontinueco kiu kaŭzas, ke ĉiu

parto inter du partoj, ĉiu paragrafo inter du paragrafoj, ŝajnas milde postulataj de la antaŭaj, kaj samtempe delikate influataj de la sekvontaj. Unika fluo de trankvila movo, samtempe majesta kaj viva, pasas de unu al alia paragrafo, de unu al alia parto, kaj kunligas ĉion en admirinda ekonomio. La intelekta spektaklo havas valoron unikan por tiu kiu scias rigardi. Oni sentas plezure ravitaj siajn sentkapablon kaj racion; el la racio, tiun parton kiu jam estas sentema; el la sentkapablo, tiujn elementojn kiuj jam estas raciemanaj.

Verkistoj germanaj aŭ anglaj neniam povos konkuri, en tiu-ĉi ĉapitro de literatura arto : neniam ili scios kun tia perfekteco konstrui artikolon. Unuj kaj aliaj kutimas kunigi tiujn partojn aŭ paragrafojn, pri kiuj ni parolis, per nura *akumulado*, kio estas la ago plej kontraŭa al la *kunmetado* kiu povas ekzisti. La angloj, pro senorda kontinueco. La germanoj pro samtempa disvolvado de pluraj elementoj aŭ *temoj*, kiuj kunpuŝiĝas, ofte tre malgracie.

Tiel, la artikoloj kiujn ni kutimas legi sur revuoj anglaj aŭ germanaj, vekas deziron refari ilin. Tiuj de la francaj revuoj, ne nur invitas ne tuŝi ilin, sed eĉ senkuraĝigas iomete verki mem artikolojn.

Alispeca laŭdo estas la sekvanta gloso, per kiu «Xenius» elegante komentariis la aktualajon de la tago: la aperon de unua volumo de nova katalunlingva «Biblioteko». Simila laŭdo al la *volo pri scio* estas oftege farita de Eugeni d'Ors. En tiu-ĉi gloso ankaŭ estas kuraĝigata la kreskanta pliedukigo de la kataluna laboristaro.

«DES GENS BIEN»

Masonisto laboradis ĉe la rekonstruaj laboroj de la supra parto de la Instituto. Je la sesa kutime li finis la laboron. Tiam li volis destini unu horon al legado en la publika legoĉambro de la Biblioteko. Sed li ne malsupreniris tien tuj post finiĝo de l' laboro. Kun ŝatinda ĝentileco, kun instinkto de admirinda aristokrateco, nia homo unue iradis hejmen, li lavis sin, ŝangis sian vestaĵon kaj reiris tiel al la dezirata legado, en pura vesto kaj dece.

Ni ĝoju la dignon kaj la elegantecon de tiu bona laboristo de Katalunujo. Kaj, egale kiel ni ĝojas la ecojn de tiu laboristo, pro tio ke li radiis puran vizaĝon, ni ĝoju ankaŭ tiujn de alia laboristo, amiko mia, pro tio ke li hieraŭ montris vizaĝon ne tiom puran. — Hieraŭ estis jaŭdo, kaj mia amiko laboristo estis forgesinta pasi ĉe la razisto. Sed li portis en la mano, kaj tute senpacience foliumadis, la malgrandan verkon pri «Oceanografio» el la kolekto «Minerva»... Kaj unu volumo el la kolekto «Minerva» kos tas tridek kvin centimojn... Ĉu vi komprenas?

Pro la fakto ne esti pasinta ĉe la razisto la jaŭdon, neniu ploras la dimanĉon. Pro tio ke oni ne iras tien hodiaŭ, neniu plendas dum la horo de

Ĝi morto. Male, povas esti bone ĉe la morthoro trovi sin iomete informita pri Oceanografio. — Sokrato, en mallibereco kaj atendente la cikuton, provadis flutan melodion. — Ho, Sokrato! — ekkriis disciplo lia; — por kio utilos nun lerni tiun flutan melodion? — Tio utilos al mi — respondis Sokrato — por ke mi havu ĝin lernita kiam mi mortos.

Kaj ni vidu alian, lastan specimenon de la ĉarma prozo de Eugeni d'Ors.

Ĝi estas tiu titolita

PRI ESPERANTO

La esperantistoj sin movis multe en Barcelono dum la lasta tempo Ili estas simpatia kaj utila aro, la esperantistoj : kiam ili moviĝas, laboras. Se pri ĉiuj oni povus diri tion, estus tre bone.

Mi devas konfesi, ke, kelkan tempon, Esperanto estis al mi malplaĉa. — Ne pro malŝato, principe, al la ideo pri lingvo konvencia kaj universala. Ĝuste tiu-ĉi ideo kunligiĝas plene kun kelkaj el la plej karaj por mi. — Sed, konkrete, kontraŭ la sistemo elpensita de Doktoro Zamenhof, mi havis iajn antaŭjuĝojn, eble devenantajn precipe de iaj optikaj impresoj... — Aliflanke, min suspektigis kontraŭ ĝi la ofte farataj laŭdoj al ĝia simpleco. Mi ĉiam havis la konvinkon, ke bona universala lingvo ne devas troviĝi en la neceso esti simpla : ĉar sufiĉe utila rezultus ĝia kono, kaj sufiĉe ĝi ŝparus aliajn laborojn, por ke valoru la penon venki kelkajn malfacilaĵojn plie en la lernado, kun bono por la plej granda perfekteco en la rezultato.

Sed ĉian antaŭjuĝon, ĉian skrupulon restantan en mi forigis jam Esperanto... — Kiel? Per ĝia efektiva triumfo super la gentoj. Ĝi konvinkis min per la unika maniero laŭ kiu io kiel ĝi povas konvinki : *venkante*... — En tio-ĉi ja la plej bona moralo estas tiu de la sukceso... — Jen lingva sistemo kiu prezentigis kun pretendoj fariĝi universala helplingvo... — Tre bone. Nu: kiu estas ĝia rajto?... — La plej forta, la definitiva: esti en la antaŭtago de sia plena universaligo!

Esperanto, ŝajnas al mi, prezentigis jam en tiu situacio. Ĝia triumfo rilate al kvanto, en malmultaj jaroj, estas ja admirinda. La esperantistoj (atentitaj la decaj proporcioj) povus hodiaŭ diri, kiel iam la kristanaj kredantoj: «Ni estas de hieraŭ kaj jam ni plenigas ĉion: la domojn, la placojn, la tendarojn...» Bona estas, do, Esperanto; kiel estas bonaj fizikaj principoj, laŭ Poincaré, la fizikaj principoj «kiuj montriĝas bonaj, kiuj havas sukceson...»

Klopodi ke Esperanto «bone sukcesu» jam estas, eble, ĝenerala homa devo. Se malgraŭ tio jam atingita hodiaŭ per la peno de la unuaj fervoruloj, ĝi morgaŭ malsukcesus, *ĉiuj, kiuj pro manko de fido aŭ pro manko de agoj estus malhelpintaj ĝian triumfon, tiuj devus senti la pezon de granda respondeco, granda konsciencioproĉo.*

Tiu favora sinteno antaŭ nia movado igas por ni ankoraŭ pli simpatia la figuron de «Xenius». Homo kiel li, ne povus alimaniere paroli pri Esperanto.

Mi kredas, ke la kelkaj Glosoj prezentitaj pruvas la talenton de Eugeni d'Ors kiel verkisto, sola aspekto en kiu mi volis prezenti lin. Vi vidis, ke li, eĉ tra miaj tradukoj, estas plene klara kaj komprenebla. Multon ankoraŭ oni povus diri pri li kiel aŭtoro de artikoloj filozofiaj aŭ pedagogiaj. Sed mi ne plu volas ĝeni vian afablan atenton. Mi restos tre kontenta, se mi sukcesis instigi iun el vi al pli profunda konatiĝo kun la verko de nia fama «Xenius».

JAUME GRAU CASAS



Fajreroj


La Universala Kongreso de Esperanto okazos nunjare en Ĝenevo, 1-8 aŭgusto, kaj konsistos el praktikaj uzoj de Esperanto por Universitataj kursoj, kaj kunvenoj de teknikistoj kaj idealistoj pri ĉiuj movadoj kaj aferoj. Ne mankos tre interesaj vizitoj kaj ekskursoj tra la ĉarma Svislando, lagoj kaj montoj, kaj la influo de granda ĉeestantaro esperantista certe efikos ĉe la Ligo de Nacioj, kies sidejo estas Ĝenevo. Petu detalojn pri aliĝo kaj ĉeesto al la Komitato de Universala Kongreso, 12 Boul. du Théâtre, Genève, Svislando.

La nova aliĝo de Grupoj al K. E. F. — Ĉar nia reorganizo estis unuanime dezirata, ĝi estis en la eksterordinara Kunveno unuanime aprobat. Ĉiuj grupoj ĝis nun prezentintaj la aferon al siaj grupanoj atingis sukcesan aprobon. — Laŭ la grupaj kaj ceteraj cirkonstancoj la aprobo fariĝas ĉu kun pligrandigo de la grupana kotizo po dek centimoj ĉiumonate, ĉu kun rezolucio pagi la Grupo el sia kaso la kolektivan aliĝon al K. E. F. — Eĉ por Grupo kiu havas cent membrojn la ĉiumonata pago al K. E. F. estas nur 10^o—ptoj. por ke ĉiuj ĝiaj membroj estu K. E. F-anoj. La K. E. F-anece rajtigas al niaj Kongresoj senpage — por ne K. E. F. anoj la Kongresa kotizo kostas kvin ptoj. — kaj al individua voĉdono. Grupoj kaj Federacio, nia tuta movado, bele unuiĝos kaj interhelpos sin per la nova organizo.

Ĉi-tiu numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la mi-
litista cenzuro.


PALMA DE MALLORCA

(BALEARA ĈEFURBO)



Promenejo Sagrera, kie oni vidas la Borson kaj la antikvan Marafieran Konsulejon, kiu nun estas Lernejo por Instruistinoj.

PALMA DE MALLORCA

SCENURBO DE LA FESTO DE LA XI^A INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Antikva Arko en la strato Almudaina


PALMA DE MALLORCA
(KONGRESURBO DE NIA XII^a)



Kapitola pordo de la Katedralo

PALMA DE MALLORCA

ĈEFURBO DE PLEJ BELA MEDITERANEA INSULO



Restaĵo de antikvaj arabaj banejoj. — La malamo de la kristanoj, kiuj forprenis de la araboj tiujn posedaĵojn detruis eĉ la ŝtonojn, kiuj povis memori tiun epokon.

La marafera Konsulejo, sur antaŭa paĝo, memorigas pri la majstra verko, «Consolat de Mar», pri maraj aferoj, kiu estas verkita en la XIII^a jarcento katalunlingve, kaj estas ankoraŭ la ĉefa kodo en la mondo de la maristoj.

Paĝo por lernantoj = Pàgina per a alumnes

Dialogo inter Jozefo kaj Jozefino, aŭ, inter Paŭlo kaj Paŭlino:

Diàleg entre Josep i Josefina, o, entre Pau i Paulina:

— Kio estas en la klaso, en la lernejo, en la domo? — Pordoĵ,
 — Què hi ha a la classe, a l' escola, a la casa? — Portes,
 muroj, fenestroj, plafonoj, tabloj kaj aliaj. — Kio estas sur la
 parets, finestres, sostres, taules etcetera. — Què hi ha sobre la
 tablo, en la klaso, sur la muroj? — Sur la tablo estas
 taula, a la classe, a les parets? — Damunt la taula hi ha
 inkujo, libroj, paperoj, kajeroj, plumoj k. a. — Kio estas
 un tinter, llibres, papers, quaderns, plomes etc. — Què és
 tio kio kuŝas en la mezo de la tablo? — Tio, kio kuŝas en la
 allò que hi ha al mig de la taula? — Allò que hi ha al
 mezo de la tablo estas sorba papero. — Mi estas junulo, fraŭlo;
 mig de la taula és paper xupó. — Jo soc un jove, un solter;
 vi estas junulino, fraŭlino. — Mi staras apud la
 vostè és una jove, una senyoreta. — Jo estic dret aprop la
 fenestro kaj vi sidas apud la tablo. La infano kiu dormas kuŝas
 finestra i vostè sèu aprop la taula. L' infant que dorm jeu
 en lito en dormoĉambro. Ĉu vi skribas, Paŭlino? Ne,
 en un llit en un dormitori. (Es que) vostè escriu, Paulina? No,
 Paŭlo; mi legas. — Ĉu via patrino estas sana? Jes; ŝi loĝas
 Pau; jo llegeixo. — La vostra mare està bona? Si; (ella) viu
 nun en Palma, kaj fartas tre bone. Dankon! — Ĉu via
 ara a Palma, i està molt bé. Gràcies! — (Es que) el vostre
 patro estas nomata Petro? Ne, li estas nomata Johano kaj mia
 pare es diu Pere? No, ell es diu Joan i la meva
 patrino estas nomata Johanino. — Kiu estas tiu sinjoro? Li
 mare es diu Joana. — Qui és aquell senyor? Ell
 estas mia onklo, kaj li ne fartas tre bone. Mi, vi, li,
 és el meu oncle, i no està molt bé. Jo, vostè, ell,
 ŝi ni, vi, ili, estas la personaj pronomoj.
 ella, nosaltres, vosaltres, ells, són els pronomes personals.
 Kiu, tiu, tiu-ĉi, neniŭ, ĉiu estas vortoj pronomaj.
 Qui, aquell, aquest, ningú, cadascun són paraules pronominals
 por persono. Pronomaj vortoj por afero estas kio, tio,
 per a persona. Paraules pronominals per a cosa són què, allò,
 ĉi-tio, nenio, ĉio.
 això, no-res, tot.

Bulgaraj Popolaj Kutimoj

Pasko

En Okcidenta Eŭropo la plej granda festo estas la Kristnasko. Ĉe la ortodoksaj slavoj, precipe ĉe la bulgarioj, la plej granda festo estas la Pasko au bulgare *Velikden* (laŭvorte : Granda-tago).

Jam antaŭ ĝi, sabate je Lazar-tago, la plej malgrandaj knabinoj iras kun korbetoj en la manoj kolekti ovojn. Enirinte en iun domon, ili nenion parolas, sed restas starantaj. Kiam la domomastrino ilin vidas, ŝi donas al ili po unu ovo, post kio ili eliras, dirante nenian vorton (La silento ja estas oro). Tio ĉi daŭras ĝis tagmezo. La saman tagon, antaŭvespere ili kunvenas kaj priparolas la vicon, laŭ kiu ili vizitos je la Palmofesto la vilaĝon. Je tiu tago, enirinte en la domon, ili haltas en la mezo de la korto kaj kantas po unu kanto por la domo kaj por ĉiu ĝia membro aparte. Post tio la gedomomastroj donacas al ili monerojn aŭ ovojn.

Baldaŭ komenciĝos la Sankta Semajno. Oni sin preparas por la granda tago de Pasko. Estas laborego ĉirkaŭ kaj en la domoj : ĉiu domomastro tutkore purigas sian loĝejon ĝis la plej lasta anguleto. Ĉio devas esti finita jaŭde. Tiam oni kuiras kaj kolorigos la ovojn kaj faros la tradiciajn Paskajn kukojn, la t. n. *kuzinaci*. La bakistoj ne scias plu kien meti a kapon. Ĉiu familio preparas almenaŭ po dekduo da tiaj kaj ĉiu kuko pezas de tri ĝis kvar kilogramoj. Tio ĉi estas la plej imponanta ceremonio dum la jaro. La tuta popolo ĝojas kaj partoprenas tiun antikvan festenon de la rostita ŝafido kiel en la tempo de Abrahamo! La tradicioj tute ne ŝanĝiĝis. Por tiu ĉi tago ĉiu devas havi novajn vestojn, ŝuojn, ĉapelon... sin vesti plej bone, solene. Je Pasko mem, kiu daŭras tri tagojn, oni sin salutas ne plu per «Bonan tagon», tamen per «Kristo reviviĝis!» kaj «Vere Li reviviĝis!» kaj manĝas paskan kukon kaj kolorigitajn ovojn, kiujn oni rompas per reciproka frapeto.

Strangaj kutimoj estas ankoraŭ praktikataj ĉe la bulgarioj. Unu el la plej belaj kaj memorindaj estas la t. n. *Proŝtopalnik* aŭ kuko okaze de la unuaj paŝoj de malgrandaj infanetoj, ĉirkaŭita de diversaj objektoj, laŭ kiuj oni antaŭdiras la estontecon de la infano.

Kiam la infaneto komencas stariĝi kaj provas paŝeti, ekregas granda granda ĝojo ĉe la familio. Baldaŭ okazos festo kaj la tuta kvartalo — parencoj kaj konatuloj — estas invitataj por la ceremonio. La malgrandul(in) o estas vestita per la plej belaj vestoj. Ornamita per ĉiuspecaj aferoj, oni enkondukas ĝin en la ĉambron, kie estas kunvenintaj la gastoj. Meze de l'ĉambro troviĝas malalta tablo sur kiu estas lokitaj diversaj objektoj : krajono, moneroj, ludiloj, libro, fadenbobeno, ktp. La infano, iom timigita meze de tiom da nekonataj figuroj, estas portata apud la tablon. Tie, post kiam ĝi ekzamenis dum kelkaj minutoj ĉiujn elmetitajn objektojn, ĝi eten-

das la maneton — ĉies spiro haltas — kaj prenas iun objekton... ekz. krajonon. Ĝojkrio trairas la ĉeestantaron. Efektive la kraĵono estas simbolo, la malgrandulo volas sin instrui, fariĝos scienculo! Kia elreviĝo por la patrino, se la infano estus preninta ludilon aŭ spegulon... Certe, ĝia «*kismet*» aŭ ĝia estonteco dependos de la elekto, kiun ĝi faros inter ĉiuj strangegaj objektoj. Ekzemple ormonero(j) signifas komerciston, kruco — pastron, tranĉilo aŭ sabreto — buĉiston aŭ oficiron, ordeno — oficiston, kukoj — frandemulon, glaso da vino — gajulon au drinkulon, florbukedeto — kavaliron aŭ virinamanton, libro — poeton, verkiston, ktp.

Poste sekvas la donacoj, kiujn la gastoj disdonas al la etulo. Fine oni proponas refreŝaĵojn al ĉiuj, konfitaĵon de rozoj kaj turkan kafon en malgrandaj taso, laŭ bulgara kutimo, atendante la fotografiston, kiu devas senmortigi tiun scenon, al kiu oni alligas tiel grandan gravecon.

Eble, kredas la popolo, iu mistera volo miksiĝas en la hazardojn de tiu ĉi kutimo. Ne arbitre kaj blinde la infano kaptas tiun au alian objekton, sed laŭ la forto de iu interna puŝo — la blinda sento, instinkto, prudento, magnetismo gvidas la unuan movon de ĝia maneto... Eble tie ĉi manifestiĝas ankaŭ atavismo.

(f i n o)

IVAN H. KRESTANOFF

(Premiita ĉe la X^aj Internaciaj Floraj Ludoj)

XI^aj Internaciaj Floraj Ludoj

Listo de verkoj ricevitaj (daŭrigo).

11. Vivo: flora ĝardeno, ŝtona krutaĵo. — 12. Don Dinero. — 13. Kial plendi se estas amo?. — 14. La poesia non muore. — 15. Omne trinum est perfectum. — 16. Pax Vobis. — 17. Marrigardejo. — 18. Libri oracula pandunt. — 19. Suno leviĝas, la mondo viviĝas. — 20. Bona lex vera lux. — 21. Vita brevis, ars longa. — 22. Se amor non ĉ, ch'è dunque. — 23. Amo venkos malpacon. — 24. Isano. — 25. Pacienco, energio kaj laboro ĉion venkos. — 26. Se ne la "se" malfeliĉa, mi estus nun homo tre riĉa. — 27. Plumo ne sentas, papero silentas. — 28. Vora el barranc dels Alcadins hi ha uns tarongers de tan dolĉ flaire que per a omplir d'aroma l'aire no té el món milors jardins. — 29. La vero-mistero. — 30. Kiu okazon forŝovas ĝin jam ne retrovas. — 31. Tapuaĥ. — 32. Felicity. — 33. Migrado, jes, migrado. — 34. Ni vidas, nenion ni scii povas. — 35. Polyhymnia.

Eraroj. Kelkaj eraroj malbeligis la lastan numeron. Oni korektu en ĝi: la premio XIII de "Caja de Ahorros y Monte de Piedad de las Baleares" estas 100 pesetoj anstataŭ 50. — La temo de premio XXXVI anstataŭ laŭvola estas "Esperanto kaj Katolikismo"

Plenumo de l' Devo

Estas malvarmega vintrotago. La suno sin kaŝas malantaŭ densaj, neĝpezaj nuboj. *Piedalte* kuŝas la neĝo sur stratoj, placoj kaj tegmentoj, kaj eĉ la palisoj estas ricevintaj dikajn neĝoĉapojn. Malmultajn homojn nur oni vidas sur la stratoj. Ĉiuj estas envolvitaj en varmigaj peltoj. Ili rapidas, por baldaŭ atingi la varman ĉambron.

Jen viro trapaŝas la stratojn, kies ĉapo ekkonebligas lin kiel fervojiston. Seriozaj, malgajaj estas liaj trajtoj. Longa, varma mantelo vestas liajn fortajn membrojn, varmaj botoj ŝirmas liajn piedojn pro la malvarmeco. En la mano li portas malgrandan, eluzitan kofron.

«Ho bonan tagon, Ernesto, kien vi volas iri dum tiu ĉi terura vetero?» Tiel ĵus renkontanta amiko alvokas lin. «Oficon!» Nur tiun ĉi unu vorton li respondas kaj neekhaltante li preterpasas la amikon. «Ne demandu, ho ne demandu!» Li dume pensas. Ho ĉiuj, tiuj preterirantaj homoj do ne scias kiel terura la ofico povas esti. Ili ja ne scias, kiel li hodiaŭ korprenite foriris el sia hejmo, kie nun lia edzino plorante en profunda doloro sole gardas apud la liteto de l' malgranda Franĉjo.

Lia ofico devigis lin, forlasi sian fileton, la sunlumon de liaj tagoj en mortiga malsaneco. «Baldaŭ, kara mia paĉjo, revenu!» Li diris, ĉirkaŭbrakante lin, «mi ja nur estas gaja, kaj mi ja nur forgesas miajn dolorojn, se vi, paĉjo estas ĉe mi. Paĉjo, kara paĉjo, baldaŭ sane revenu!»

Kaj se li revenus, kaj la febranta korpo de lia karuleto estus malvarmiginta, mortinta! Ho, ne elpensebla doloro! — Kaŝite rulas larmo en lian barbon, kaj liaj paŝoj pli kaj pli malrapidiĝas. —

Jen li vidas la domojn de l' stacio. Li rektigas sian korpon kaj rapide alpaŝas la lokomotivejon. Kun movo de l' mano, kvazaŭ forŝovanta ĉiujn ĝis nun lian koron premantajn hejmajn zorgojn li eniras tra la portalo, levigante la kapon. — Ofico. —

Neĝas, neĝadas, senĉese neĝadas! Terura ventego trablovas la tutan regionon, ventego, kiel similan eĉ la plej maljunaj homoj ne rememoras. Jam krepuskas. Malklare, duone nur oni povas rigardi la ĉirkaŭaĵon en la komenciĝanta vespero.

Fantome la lumo, brilanta el la fenestro de la rapidvagonaro kiu per rapidegeco traveturas stacion post stacio, preterflugas arbojn, vilaĝojn kaj kampojn, fantome kaj tuj ilin lasante en ilia malheleco kaj malgajeco.

Sed en la vagonaro regas ĝojo. Hele la lampoj lumas. Gajaj homoj sidas en la kupeoj, parte babilantaj, parte legantaj, kelkaj ankaŭ dormantaj, ĉiuj samaj, kvazaŭ ne ekzistus zorgoj.

Nur unu el tiuj homoj en la rapidvagonaro ne estas senzorga, ne povas, ne rajtas dormi. Estas la maŝinisto sur la lokomotivo. Streĉe li trarigardas la mallumon antaŭ sia maŝino, nur iomete eklumigitan per la lanternoj de la lokomotivo. Per rapideco de 70 kilometro po horo la vagonaro ton-

dradas sur la neĝkovritaj reloj. Kiel ombroj nur venas kaj malaperas la lumigitaj signaĵoj apud la reloj, pene observataj de l' maŝinisto.

Ĵus ekleviĝas lumo kaj ĝiaj radioj, iomete nur penetrante la neĝopezajn nubojn, ĉirkaŭvagas kiel koboldoj de reloj al arboj, de arboj ree al reloj.

Kelkajn horojn jam la maŝinisto Ernesto gvidas la lokomotivon. Preskaŭ ĉiam per sama rapideco la vagonaro traflugas la relvojon, takte, enuige sonas ĝia bruo.

Neniam en lia vivo la vojo ŝajnis al li tiel longa, kiel hodiaŭ la sama vojo, kiun li jam centfoje traveturis. «Nur hejmen, hejmen!» Io vokas en lia cerbo. Ĉu estas la malvarmega ventego, kiu incitegas liajn nervojn, aŭ ĉu estas lia malsana infaneto, kiu vokas lin? Li ne plu vidas la relvojon, li sole nur vidas sian fileton sin turnadantan en febro. «Ho, Franĉjo, kara mia Franĉjo, mi venas, mi ja venas!»

Akra ventpuŝo lin retiregas al la realeco. Li rektigas sin, ektimegas pri sia devorompo. Tuj li streĉas sian tutan atenton ree al la relvojo. La vojaĝantoj malantaŭ li ja ne konas la danĝeron, en kiu ili troviĝas en ĉiu minuto. Ili ja ne pripensas, ke nur unu momento de malatento de l' maŝinisto jam povas kaŭzi teruran malfeliĉon, povas porti profundan malĝojon kaj funebnon en multajn familiojn de l' tuta lando, ĝis nun kontentajn kaj gajajn. — Sed li konas sian devon. —

Kaj per nemalpliigita rapideco traveturas la vagonaro la neĝoventegon. Freneze ĉirkaŭflirtadas la neĝeroj. Iom post iom disiĝas la nebulo, kaj la siluetoj de la lumsignaloj pliheliĝas. Jam oni traveturas la unuajn reŝanĝilojn de l' stacio kaj takte bruas la vagonaro, kvazaŭ kriante: «Kiel li fartas, la bona knabo, kiel li fartas la bona knabo, kiel li far — »!!

«Ekhaltu!» subite laŭte krias la hejtisto en la orelon de Ernesto. «Ekhaltu! Ĉu vi ne vidas jen antaŭ ni lumojn de l' vagonaro?» Nur unu rigardon antaŭen, tiron de l' haltigilo, kaj la vagonaro malpliigas sian rapidecon. «Signalu, mi returnen veturos!» krias Ernesto kaj la hejtisto saltas de sur la lokomotivo kaj renkontenrapidegas al la alveturanta vagonaro, svingante sian lampeton. Subite, fulme eklumas penso en la cerbo de Ernesto: «Kiel, se vi ankaŭ desaltas! Tiam vi estos certe savita! Memoru Franĉjon! Kion valoras al vi la vojaĝantoj malantaŭ vi? Sed ili konfidis al mi! For, for logiloj de l' infero! La danĝero min trovu sur mia loko!» Pene li rigardas tra la fenestreto kaj la vagonaro malrapide komencas veturi returnen.

Sur la lokomotivo de l' alia vagonaro oni jam same ekkonis la danĝeron, ekvidinte la lampeton de l' hejtisto. Oni tiris la haltigilon. Sed tamen — laŭta krakado — centvoĉa ekkrio kaj tiam momento de terura silento. Ambaŭ lokomotivoj estas karambulintaj. Dank' al Dio la frapo ne plu estis sufiĉe forta por detruji la vagonarojn, nur la lokomotivo de l' rapidvagonaro estas defektita kaj elreliĝinta.

La pordoj de la vagonoj estas malfermataj. Parte ankoraŭ time, parte jam trankviliĝinte eliras el ili la vojaĝantoj. Laŭte babilante ili ĉirkaŭvagas la lokon de l' katastrofo, kiu nur malhele estas lumigita per la lam-

petoj de l' fervojistoj. Sed baldaŭ unu post la alia foriras al la proksima varma stacidomo. Kaj sur la loko kondukista de la lokomotivo kuŝas solece Ernesto, mortinta, dispremita inter la maŝino kaj tendro. Ofero de la plenumo de l' devo.—

Apud la lito de l' Franĉjo sidas la patrino. «Trankviliĝu, kara fileto! Dormu, dormu! Baldaŭ via kara paĉjo revenos, baldaŭ, baldaŭ—!»

Devo.—

CURT LE

(Premiita ĉe la X^a Internaciaj Floraj Ludoj)

Fajreroj

Voĉdono pri uzo de landnomoj. — Unu komitatano pro peto de Prof Cart kaj alia propramove proponis ke la Centra Oficejo revenu al uzo de -ujo en landnomoj. Per 12 voĉoj kontraŭ 4 la komitato malakceptis tiun vidpunkton kaj konfirmis, ke la Centra Oficejo fidele aplikas la rekomendon de la Viena kongreso, ke oni konfirmiĝu al la Fundamento, se ĝi sekvas la principon esprimitan en la Klasika Libro de l' Akademio: «La finaĵo -io (ne sufikso), kiam internacia en landnomo, ne estas kontraŭfundamenta (Germanio apud Germanujo, kiel evolucio apud evoluo, Fundamento * 15) En dubaj okazoj la Centra Oficejo uzos la formon en -lando ankaŭ perme-seblan laŭ la fundamento. La komisiono unuanime instrukiis la Centran Oficejon daŭre sekvi tiun principon senescepte.

La sistemo de D-ro Zamenhof pri Landnomoj. — Tie ĉi mi deziras simple klarigi por tiuj, kiuj ĝin ne bone komprenis la sistemon de nia Majstro pri la Landnomoj: — 1.^a Koncerne la landojn de la Malnova Mondo (Eŭropo, Azio), la «indigena» popolo donas sian nomon al la lando: Germano-Germanujo, Ĉeĥo-Ĉeĥujo; Slovako-Slovakujo; kunmetitaj, Ĉeĥoslovakujo k. t. p. — Tamen la landnomojn, kiuj finiĝas per... lando, D-ro Zamenhof konservas sensanĝe: Holando (Regnano: Holandano). (*) 2.^a Koncerne la landojn de la Nova Mondo (Ameriko, Afriko, Aŭstralio) kie la «enmigrantoj» fakte malaperigis la indigenan popolon, li alprenas la nomon mem de la lando, esperantigante ĝin, kiam eble. — Ĉu ne klara, ĉu ankara tia sistemo? Ne — Neniu sistemo, (pri la Landnomoj), skribis Prof. Grosjean-Maupin, la Akademia Raportinto pri la demando (1922), estas plene rekomendinda «el teoria vidpunkto; pro tiu motivo ni devas konsideri nur la praktikan vidpunkton, el kiu la fideleco al la ĝisnuna tradicio (la Zamenhofs) estas pli sendanĝera ol ia ajn provo». ** — Th. Cart — Prez. de la L. K.

(*) Skotujo (Skoto), (Fin(n)ujo) (Fin(n)o) estas cetere korektaj formoj, sed malpli ofte uzataj ol Skotlando, k. t. p. ** Raporto aprobita de la Akademio kaj de la L. Komitato (Nov. 1922).

Murafiŝoj pri nia Kongreso en Palma. — Grandaj, belaj, artaj estas eldonitaj de la Organiza Komitato de nia XII^a okazonta en Mallorca. — Ĉiuj grupoj aŭ samideanoj, kies cirkonstancoj permesas al ili lokigi tre videble, tre publike kaj fiere afiŝojn esperantistajn, bonvolu peti de ni ekzemplerojn.

La Somera Universitato. — La ĉefa novaĵo por la esperantistaro en 1925 estos la Somera Universitato en nia lingvo. Jam antaŭ la milito D-o Privat projektis tiun aferon kaj de la 1 ĝis 7 aŭgusto 1925 li intencas ĝin realigi unuafoje laŭ la jena programo, se sufiĉa nombro da partoprenontoj enskribiĝos: Vendredon, 31 julio, vespere, la somer-kursoj en Esperanto solene malfermiĝos per ceremonio ĉe la Ĝeneva Universitato sub prezido de ties Rektoro. — Sabaton, 1 aŭgusto, la prelegoj komencos kaj okazos regule ĉiumatene. La somer-universitato enhavos kredeble kvar sekciojn, unu pri pedagogio kaj psikologio, unu pri lingvo-scienco, unu pri fizika scienco kaj unu pri internacia juro. — La unua sekcio estos aranĝata rekte de la universitata lernejo de pedagogiaj sciencoj (Instituto J. J. Rousseau) sub persona gvidado de la konata Prof. Pierre Bovet. Krom la prelegoj pri psikanalizo kaj novaj pedagogiaj metodoj, la sekcianoj kunvenos en la instituto kun Profesoroj Bovet, Baudoin, Flügel, de la Londona Universitato k. a. por interparoli pri tiuj temoj kaj kune vizitos interesajn lernejojn, eksperimentaĵojn, ktp. Tiu fako interesos antaŭ ĉio la ĝeinstruistojn kaj edukistojn. — La dua sekcio estos aranĝata de la Internacia Instituto de Esperanto. Prof. Collinson, de la Liverpoola Universitato, kaj aliaj diverslandaj lingvistoj prelegos tie pri la historio, literaturo kaj sintakso de nia lingvo kaj pri lingvoscienco ĝenerale. Ĝi interesos ĉefe tiujn, kiuj deziras pliperfektigi sian konon de Esperanto kaj kapabliĝi por instrui ĝin. — La tria sekcio dediĉos prelegojn al scienco kaj tekniko de radio, celante aŭdigi en nia lingvo klaran instruadon pri tiu temo per kompetentaj scienculoj el diversaj nacioj. — La kvara sekcio estos aranĝata kun helpo de la Ligo de Nacioj, de la Internacia Labora Oficejo, de la Universala Poŝta Unio, de la Universala Telegrafa Unio kaj de la Internacia Komitato de la Ruĝa-Kruco.

Por aliĝo petu detalojn de Universala Kongreso, 12, Bd. du Théâtre, Genève, Svislando.

La unuaj sciigoj pri la 3-a Kongreso de Iberiaj Esperantistoj. — Loko: La kongreso okazos en Córdoba (Andaluzio). Tempo: 10 ĝis 12 majo 1925. Kotizo: 5 (kvin) pesetoj, blinduloj senpage. Loka Kongresa Komitato: Honora Prez.: s-ro Pablo Linares Rapet. Prez.: s-ro Francisco Serrano Olmo. Kas.: s-o Juan Serrano Olmo. Sekr.: s-o Joseph Berger. Voĉdonantoj: s-oj Francisco Azorin, Rogelio Luque, Pantaleón Marivela. Por blindulaj aferoj: f-lino Anita Mejías. Kongreslibro estos eldonata multilustre kaj servos samtempe kiel valora gvidilo tra la sunbrila, ĉarmplena regiono andaluza. — Komuniko pri la kongreso aperos ankaŭ en «La Suno Hispana». — Adresoj: por monsendo: Juan Serrano Olmo, calle Reloj, 1. Por kores-

pondaĵoj : Joseph Berger, Claudio Marcelo, 18. — La L. K. K. petas la tutmondan esperantistaron helpi laŭpove per seriozaj proponoj kaj multnombra aliĝo.

Esperanto en Barcelona Radiotelefonio.—Klopodoj diversflanke faritaj de niaj karaj samideanoj Paluzie, Bartomeu, Valdepeñas, Bregon, Serrat kaj aliaj atingis akcepton de nia lingvo en la Radio stacio de nia urbo. La San de Marto okazis parolado de nia Prezidanto en Esperanto pri la en Majo okazonta Kongreso de nia Federacio en Palma de Mallorca. Poste, kantos, deklamos aŭ parolos en Esperanto PalmiraCastellvi, Jaume Grau, Dro. Bregon, Joan Gili, Marian Solà kaj aliaj gesamideanoj en Barcelona.

Bonyeninta estu nia kara Prezidinto kamarado Joan Gili Norta, kies kunesto inter ni estos helpa kaj efika al nia Movado. Bedaŭrinde li nur antaŭ kelkaj tagoj revenis de transmario kaj post kelkaj monatoj refoveturos transmaren. — Sed certo ke ĉie li laŭ eble laboras por defendo de nia afero, malpezigas nian bedaŭron pro lia foresto — ĉar li samideanece neniam forestas.

Novaj Komitatoj en Palma de Mallorca. — Pro la elektoj en la lasta Ĝenerala Kunsido okazinta ĉe «Esperantista Klubo Palma», la direktanta Komitato de tiu-ĉi Grupo konsistas el la jenaj gesamideanoj : Prezidanto : S-ro J. Rosselló; Vicprezidanto : S-ro B. Font; Sekretario : S-ro N. Terrassa; Vicsekretario : S-ro J. Juan; Bibliotekisto : S-ro J. Molinos; Voĉdonantinoj : F-inoj. C. Muntaner, T. Bauzá kaj J. Oliver. — La membroj de Universala Esperanto Asocio en tiu-ĉi urbo elektis S-ron N. Terrassa, Delegito, kaj S-ron Salom, Vicdelegito.



Nekrologo

S-rino Felicidad Zamora de García, lerta kaj fervora esperantistino el Manila, kiu, en halto de traveturado loĝis en nia urbo kun ŝiaj fratinoj kaj filineto, mortis la 12^{an} de februaro. Multaj samideanoj kiuj havis ĝojon kaj honoron interkonatiĝi kun tiuj ŝatindaj orientaj samideaninoj, kiuj tuj varbis al si nian amikecon kaj fratecon, partoprenas la ĉagrenon de familioj en Barcelona, Zamora kaj García, kiujn ni petas kredi nian ĝsinceran kondolencon.

ATENTU, LEGU, KOMPRENU:



Nur maŝinskribitaj manuskriptoj sur unu flanko de ĉiu paperfolio, ĝenerale korektaj en kataluna aŭ esperanta lingvoj estas akceptotaj

Ĉu akceptitaj aŭ ne, originaloj neniam estas resendotaj

«Deklaracio pri Esperantismo» — (Akceptita de la Unua Kongreso, en sia lasta kunsido) — Ĉar pri la esenco de la Esperantismo multaj havas tre malveran ideon, tial ni subskribintoj, reprezentantoj de la Esperantismo en diversaj landoj de la mondo, kunvenintaj al la internacia Kongreso en Boulogne-sur-Mer, trovis necesa laŭ la propono de la aŭtoro de la lingvo Esperanto doni la sekvantan klarigon — 1 La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu «ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn», donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia Esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero pure privata por kiu la Esperantismo ne respondas»

El «Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia» — «Fundamenta Krestomatio» — Per si mem la lingvo internacia ne sole ne povas malfortigi la lingvojn naciajn, sed kontraŭe, ĝi sendube devas konduki al ilia granda fortiĝado kaj plena ekflorado: dank' al la neceseco ellernadi diversajn fremdajn lingvojn, oni nun malofte povas renkonti homon, kiu posedus perfekte sian patran lingvon, kaj la lingvoj mem, konstante kunpuŝiĝante unuj kun la aliaj, ĉiam pli kaj pli konfuziĝas, kripliĝas kaj perdas sian naturan riĉecon kaj ĉarmon»

1 0 0 0 0

membrojn
devas
havi

U E A

en 1925. .

Aliĝu tuj por atingi

1 0 0 0 0

Aliĝojn akceptas la lokaj Delegitoj, aŭ
la Delegito en Barcelona :
S-ro Delfi Dalmau, Carrer València, 245

«Kataluna Esperantisto»

ĈIUMONATA 16-PAĜA GAZETO
OFICIALA ORGANO

DE LA

INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Plej bonaj verkaĵoj de plej bonaj aŭtoroj ĉieaj.

Tradicie tre bona laŭ stilo kaj presoj.

Jarabono 6 svisaj frankoj aŭ egalvaloro efektivigebla en Barcelona

Adr.: Carrer València, 245. — BARCELONA

Ĉiuj gazetoj kiuj bonvolos represii nian anoncon rajtos similan pri si, por kio bonvolu sendi tekston publikigotan en nia gazeto.